

Ni dankas al Fritz Schwarz
kaj la vana laboro de kolektemuloj
Claude Gacond, 315-a radioprelego, 1969.10.22 & 25

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En la rubriko **Anoncetoj** en la UEA-revuo *Esperanto* ni legas :

A.- « *Ege interesas min kompletigi miajn kolektojn de Pola Esperantisto, Aŭstria Esperantisto, American Esperanto Magazine, La Movado franca kaj La Ondo de Esperanto. La posedantoj de malnovaj numeroj bonvolu skribi al : Sinjoro Ramôn Molera, Sta. Joaquina, 13, Moyà, Barcelona, Hispanujo.* »

Cl.- Kelkajn paragrafojn poste ni ankoraŭ legas :

A.- « *Mi deziras akiri malnovajn Kongreslibrojn, Jarlibrojn de UEA, SAT, IKUE, kaj tiel plu. Skribu al : Sinjoro Ramôn Molera...* », kaj revenas la sama adreso.

Cl.- Kiam ni legas similajn anoncojn, ni nin ĉiam faras la demandon : ĉu tiu kolektemulo laboras nur por si, aŭ ĉu li kolektas por riĉigi arkivaron, kiu postvivis lian morton ? Ni nin faras tiun demandon, ĉar ni povis konstati, ke multfoje gravaj arkivoj, kiuj troviĝis en la manoj de kolektemuloj, estis detruitaj en kelkaj horoj post ilia morto fare de la heredantoj, kiuj ne komprenis aŭ ne volis kompreni pri la dokumenta kaj historia valoroj de la rikoltitaĵoj.

A.- Koncerne tiun temon kolektado de esperantaĵoj ni volas hodiaŭ honori la memoron de svisa samideano legante al vi nekrologian artikolon, kiun ni verkis por la gazeto *Svisa Espero* sub la titolo *Ni dankas al Fritz Schwarz*.

Cl.- « La 23-an de junio 1969 mortis en Thun nia samideano Fritz Schwarz en sia 87-a jaraĝo. Tiu morto nin malriĉigas de energia kunlaboranto.

A.- Fritz Schwarz naskiĝis en Thun je la 20-a de decembro 1882. En tiu urbo li studis, laboris kaj pensiigis. Ĉar li aktive partoprenis la lokan vivon en kant-, religiaj kaj politikaj rondoj, li fariĝis iom post iom unu el tiuj figuroj, kun kiu la urbanoj emas identiĝi.

Cl.- Fritz Schwarz ne nur entuziasme partoprenis la esperantan vivon. Li ĝin influis. Plurajn manifestaciojn li organizis. La gvidadon de Svisa Esperanto-Societo li helpis. La funkcion de arkivisto li komplete renovigis. Li komprenis, ke movo ne sufiĉas por garantii la kreskadon de la esperantismo. Li komprenis, ke estas vane aranĝi kongresojn, doni sian tempon al la gvidado de movado, se samtempe la dokumentoj, kiuj atestas pri tiu aktiveco, definitive perdiĝas. Inter la pioniroj raras la homoj, kiuj komprenas la valoron de la skribitaj dokumentoj. Kiel Edmond Privat, Fritz Schwarz estis pioniro, kiu rikoltis.

A.- Sed rikoltado ne sufiĉas. Kiam ĝi iĝas kolektemo, ĝi eĉ montriĝas vana kaj danĝera. Kiom da valoraj dokumentoj perdiĝis, ĉar ili falis en la manojn de kolektantoj, kiuj laboris nur por si mem. Fritz Schwarz komprenis, ke ni devas venki tiun individualismon, ke anstataŭ rikolti por si mem, oni devas sin meti je la servo de la kolektiveco. Se dum jaroj li mem rikoltis la plej diversajn dokumentojn pri la esperanta vivo, kiam, en 1952, li fariĝis arkivestro de Svisa Esperanto-Societo, li kunigis la hejme amasigitan dokumentaron kun la libroj kaj arkivoj de Svisa Esperanto-Societo. Kaj li komencis redakti *Katalogon pri la konsisto de la arkivoj de la Svisa Esperanto-Societo*, kiu atestas pri tiu kuniĝo. Tiu dika tajpita dokumento aperis kvar-ekzemplere en 1955. Kaj poste, monaton post monato, ĝi estis riĉigita de novaj dokumentoj.

Cl.- Se oni atente ekzamenas tiujn arkivojn, oni rimarkas, ke ilia ĉefa fonto estis la individua rikoltado. Ĝis nun, almenaŭ en Svislando, la esperantistoj ne ankoraŭ komprenis, ke la arkivoj de Svisa Esperanto-Societo estas la memoro de nia svisa movado. Kiam homoj mortas, kun ili malaperas la memoro pri la pasintaĵoj. Nur se ili kapablis transdoni objekte klasigitajn

Ni dankas al Fritz Schwarz
kaj la vana laboro de kolektemuloj
Claude Gacond, 315-a radioprelego, 1969.10.22 & 25

dokumentojn, ili laboris al la konservado de la pasinteco. Iom el ilia memoro iel transvivas ilian morton.

A.- Fritz Schwarz konstatis, ke kiam la kolektemo restas individua hobbio, ĝi ĝenerale finiĝas per definitiva detruo. Kiom da gravaj leteroj, manuskriptoj, raraj broŝuroj, historiaj cirkuleroj malaperis, ĉar ilin rikoltis por si mem kolektemuloj, kiuj neniam komprenis, ke kio estas al ili multvalora, tio povas esti senvalora por la gefiloj. Kolektemuloj mortas. La gefiloj, kiuj malamas tiun kolektemon, tiam forĵetas la frukton de la patra hobbio.

Cl.- Tro ofte la homoj ne vidas pli foren ol si mem. Ili vivas, kiel se ili estus eternaj. Fritz Schwarz evitis tiun rifon de la subjektiveco. Nur la historiistoj kapablos taksi lian gravegan laboron.

A.- La gazetoj, libroj, fotoj pri kongresoj, leteroj, raportoj pri kunvenoj, eltranĉaĵoj de gazet-artikoloj, poŝtmarkoj, manuskriptoj, zamenhofaĵoj, kiujn li rikoltis kaj registris, formas tuton, kiun ni facile povis translokigi en la publikan bibliotekon de la urbo La Chaux-de-Fonds. Tuj tiu arkivaro estis konsultebla, kaj nun ĝi estas unu el la fontoj de la dokumentaro, kiu permesis la kreadon de Centro de Dokumentado kaj Studado pri la Internacia Lingvo.

Cl.- La serĉantoj, kiuj trastudos la arkivaron de Svisa Esperanto-Societo rimarkos, ke sen la diligenta laboro de Fritz Schwarz ni troviĝus antaŭ neripareblaj mankoj. Svisa Esperanto-Societo travivis krizojn, kiuj faras, ke ĝi eĉ ne posedas kompletan kolekton de sia organo *Svisa Espero*. Trifoje ĝi disvendis sian arkivaron, kaj tiuj dokumentoj perdiĝis ĉe kolektemuloj. Fritz Schwarz metis finon al tiu diletantismo. Pro tio li markas etapon en la historio de nia svisa movado. Li kapablis eviti efemerajn laborojn profite al fundamenta funkcio, kiun li plenumis kun vera talento.

A.- Kiam ni vizitis Fritz Schwarz okaze de la transpreno de la arkivista funkcio, ni povis konstati, kiom multe lia edzino lin helpis. Kvankam ŝi ne parolis esperanton, ŝi tamen bonege komprenis la gravecon de la laboro de sia edzo, kaj ĝin ŝi faciligis. Al ŝi iras nia dankemo kaj la esprimo de nia amika simpatio.

Cl.- La ekzemplo de Fritz Schwarz instigu plurajn svisajn esperantistojn, ĉefe kolektemulojn, repensi sian agadon. Ili ĉesu rikolti por si mem kaj komencu kunlabori al la riĉigo de kolektiva arkiva centro. Estos inteligenta maniero danki al Fritz Schwarz. »

A.- Kaj se inter niaj radio-geaŭdantoj troviĝas kolektemuloj, kiuj ne ankoraŭ kunlaboras kun arkiva centro, ili ankaŭ repensu sian agadon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-